Daŭre disvolviĝas la 2 kursoj. La ĝelernantoj de la 1a-grada (2 fidelulinoj veturas preskaŭ 50 kilometrojn ĉiufoje!) baldaŭ atingos la finon de la "Junulkurso" kaj "la progresantoj" sekvas atenteme la progreson de la enketo de sveda policisto pere de la libro "Roseanna".

Intertempe estis akceptata samideano el Litovio, kiun gastigis la prezidanto de la klubo, P. Canus (aparta raporto).

Ĝus trapasis "ateston pri lernado" 10 staĝanoj de "Institut des Forces de Vente 55" (gvidis la kurson F.-X. Gilbert). 6 ricevos oficiale sian diplomon fine de la staĝo en entreprenoj.

La kultura jara ekskurso de la klubo celis la famekonatan kristalfarejon en VANNES-le-CHATEL (2 Laksuanoj partoprenis!), vizito kronita de gustum-halto en vinkelo apud TOUL...

La Zamenhof-vespero restos agrabla memoraĵo por la 20 partoprenintoj: skeĉoj, ludoj, kantoj, aŭskulto de raraĵo: registrita voĉo de Zamenhof... kaj bongusta manĝo.

Almenaŭ 2 klubanoj partoprenos la Nacian Kongreson de UFE en BOULOGNE-sur MER kaj 2 aliaj aliĝis al la Universala Kongreso de UEA en BERGEN.

Kvazaŭ "rekte" en Litovio...

P. DENIS

Sinjoro Zigfried POLIAKS, kiu forlasis sian latvian urbon RIGA fine de januaro por prelegi en 18 urboj tra Francio, alvenis ĉe ni, en BAR-le-DUC, akurate laŭ la programplano, lundon 25an de februaro.

Vespere je la 18a 23 (!), ano de la klubo akceptis lin ĉe la kajo de la stacidomo. BAR estis la lasta halto de lia vojaĝo. Iom laca sed tamen tre bonhumora kaj dinamika, Zigfrid jam petis, ke la grupo preparu lian akcepton en Parizo por prizorgi la revojaĝon al RIGA. Dank' al kontakto de diversaj klubanoj en Bar, kiuj telefonis al parizaj esperantistoj, la alveno kaj restado en la ĉefurbo estis tuj solvitaj.

Hejme, antaŭ la konferenco, sonbendo de latviaj kantoj, kiun ni aŭskultis dum la manĝado, incitis nian petolan gaston forlasi la tablon por danci kun la gastigantino kelkajn minutojn; sed la horo de la prelego rapide alproksimiĝis kaj ni iris al la urbdomo.

Malgraŭ la grava propagando farita de nia vigla "animanto", nur 20 personoj ĉeestis. Sr° Poliaks klarigis pri sia lando kaj komentis video-bendon, kiun li kunportis. La temo estis la lastaj eventoj en Riga, kie li estis ankaŭ aktoro. La ĉeestantoj faris multajn demandojn, al kiuj li ĉiam bonhumore kaj kontentige respondis. La kunveno interesis ĉiujn, sed tro rapide alvenis la momento de la disiĝo. Ĉiuj partoprenintoj foriris, aprezinte tiun tre interesan kontakton kun tiu 40-jara latvia "ŝoforo" en kolkozo.

Post bona ripoznokto, rapidega vizito de Bar-le-Duc, Sr° Poliaks, tre ĝoja je la penso baldaŭ revidi siajn edzinon kaj ĝeinfanojn, forlasis nin la mardon 26an, iom post la 12a, por atingi Riga tra Parizo kaj Berlin.

Pierre CANUS

STRASBOURG ☆

Mardon, la 6an de februaro, ni havis la ĝeneralan asembleon de nia strasburga klubo.

Kiel ĉiam, mi anoncis ĝin en la loka gazeto. Venis du eksterlandanoj: unu Japano (el Tokio), kiu bone parolis sed devis reforiri al sia lando post du monatoj, kaj unu studento el Oslo, kiu forlasis Strasburgon fine de la lernjaro, do en junio... bedaŭrinde! Mi ankaŭ menciu la ĉeeston de junulo el Cambodge.

Iom antaŭe, la 12an de januaro, ni havis belan Zamenhof-feston. Ĉeestis 25 personoj: 7 el Stuttgart (nia ĝemelita urbo), 8 el Oberkirch kaj ĉirkaŭaĵo, 4 el Dijon kaj... 6 Strasburganoj!

BESANÇON ☆

Marianne MULLER

"Pourquoi l'Espéranto facilite-t-il tant les contacts et l'apprentissage des autres langues?"... tel était le thème de la conférence donnée à Besançon le 9 novembre dernier par Claude GACOND, Directeur du Centre Culturel espérantiste et archiviste au Centre de Documentation et d'Etude sur la Langue Internationale de la bibliothèque publique de La CHAUX-de-FONDS (Suisse), et de surcroît conférencier à Radio-Suisse Internationale à BERNE.

Cette conférence était placée sous les auspices de l'Université Ouverte de Franche-Comté, tout comme celle de Pierre JANTON, Professeur d'anglais à l'Université de Clermont-Ferrand qui avait traité en mars dernier de "l'Espéranto et le problème des langues en Europe".

Lucienne TREHEL

NANCY

VESPERAJ KURSOJ ☆

La vespera kurso en Nancy startis la 10an de oktobro. Pro ŝanĝo de metodo (uzata studlibro: "Junulkurso"), 4 gelnantoj de la pasinta jaro deziris lerni duan fojon la unuan gradon!... Kaj venis ek de la unua leciono sufiĉe granda nombro da novuloj; kelkaj ne revenis sed ĉiusemajne poste alvenis 1 nova persono! Finfine la nombro de aliĝintoj stabiligis je 17! Ni atingis la 10an lecionon antaŭ la Kristnaskofesto.

Nun fine de marto, restas 12 gelnantoj, kiuj komencas korespondi; ni atingas la finon de la kurso kaj tre baldaŭ eklernos "Metodo-n 12". La kurso okazas de la 19a ĝis la 20a30 ĉiumerkrede. Kurso 2a-grada ne plu okazas, ĉar ne sufiĉe multe da interesatoj. La 3a-grada okazas je la 17a30 ankaŭ merkrede, ne dum decembro sed dufoje januare kaj poste unufoje monate.

Konversacia rondo okazis nur dufoje, la 21an de novembro kaj 12an de decembro je la 20a30, kun respektive 5 kaj 3 partoprenantoj.

Mi provas nun ekfunkciigi "rapidan", 10-leciana kurson, merkrede je la 20a30 (ni disponas kursĉambron ĉiumerkrede vespere) ek de la 3a de aprilo. Minimuma nombro de lernantoj estas postulata por ke la kurso efektive okazu.

KURSO EN A.L.A.G.H. (Association Lorraine d'Aide aux Grands Handicapés) ☆

Planita estis laĝrada kurso malfermita al handikapuloj kaj al personoj de la kvartalo "Haut du Lièvre". Sed neniu venis; sekve funkcias nur 2a-grada kurso per "M12" por 3 personoj, kiuj jam lernas esperanton de unu jaro. Ĝi okazas vendrede je la 16a, principe 2foje monate. Sed "M12" montriĝis tro malfacila. Ni do revenis al la "Junulkurso".

RADIO-INTERVJUOJ

Sekve al dissendo de komunikoj pri niaj kursoj al aro da elsendejoj en Nancy ("liberaj" aŭ ne...) mi ricevis proponon por pagita reklamo en unu el la "komercaj" radioj kaj sinsekve 2 petoj telefonaj de 2 malsamaj ĵurnalistinoj de "RADIO-FRANCE Nancy".

La unua intervjuo ŝajnis relative bona kaj okazis precize la 9an de oktobro (1 tagon antaŭ la malfermo de parola kurso); la 2a okazis la 3an de novembro. La unuan fojon mi povis multe diskuti pri Esperanto kaj pri la kursoj sed ne aŭdiĝis E°-kantoj. La duan fojon male mi povis aŭdiĝi 2 kantojn (de Olivier TZAUT) kaj Max-Roy CARROUGES) sed la ĵurnalistino videble "preferis" la anglan kaj ne eblis al mi multon diri!

VARBADA KONKURSO DE LA FEDERACIO ☆

En la ĵus pasinta konkurso (pri la perkoresponda ellernado) gajnis denove la premion (abono al "MONATO") la grupo de MULHOUSE, kiu varbis 8 gelnantojn (kaj krome "gvidas" ilin). Varbis ankaŭ S-in° NAU en MONTIGNY-lès-METZ (4 varbitoj!), S-in° SCHEIDEL en BETSCHDORF (2) kaj Sr° NEEL en CHALONS-sur-MARNE.

Gratulon al ĉiuj!

KIEL ONI PLEJ EFIKE VARBAS GELEARNANTOJN?... ☆

17 gelnantoj do ĉeestas ĉi-jare nian vesperan kurson. Tre bone... sed kiamaniere ili estis varbitaj? Mi enketis al ĉiuj, jen la rezulto:

Unua demando: Kiel vi ekscitis pri la ekzisto de E°, pri kio estas E°?

= Respondoj: Jam aŭdis pri E° de multaj jaroj... ?! (pere de sia patrino: 1; pere de afiŝoj: 2; pere de onklo: 1; pere de flugfolioj: 4; pere de filo: 1; pere de radio "France-Inter": 1.

Dua demando: Kiel vi ekscitis pri la nuna kurso?... el sia filo: 1; ...patrino: 1; ...afiŝo: 1; "EST REPUBLICAIN": 2; "Dernières Nouvelles d'Alsace": 1; ... Fête de l'Homme en THAON: 2; ... de flugfolioj: 3; ...Radio-France: 1; ...de afiŝoj: 2.

Jean-Paul COLNOT

SERIO DE EKSPOZICIOJ EN NANCY ☆

La belan ekspozicion de la Federacio, freŝe renovigita de Pol Denis, mi ricevis fine de marto, tio estas pli ol du semajnojn antaŭ la planita dato (mi planis 15/30an de marto).

Mi povis unue prezenti ĝin en HAGH, sed tie vidis ĝin nur la surlokaj handikapuloj. Malgraŭ komuniko en la gazetaro, neniu alia venis. De la 11a ĝis la 18a de marto, mi prezentis ĝin en la Granda Halo de la Urb-Domo de NANCY. Tie preterpasas ĉiutage centoj da personoj sed ili ĝenerale rapidas al la oficialaj servoj, malmultaj interesiĝas pri ekspozicioj. Mi deĵoris tie 1 horon matene kaj 1 horon vespere kaj povis alparoli 38 personojn. Kelkaj ŝajnis tre interesataj. Ĉiam kun helpo de Henriko, ni translokigis la ekspozicion la 18an de marto al Junul-Domo "Lillebonne" en malnova kvartalo de Nancy. Tiu junuldomo estas fama pro siaj prezentaĵoj en riĉe kultura kvartalo. Tie mi povis alparoli 31 personojn. La sabaton 23an kaj dimanĉon 24an de marto, ni prezentis la ekspozicion en "Festo de la naturo kaj ekologio" en Junul-Domo Henri Bazin. Ĉar mi ne havis eblecon senĉese deĵori la 2 tagojn, sinsekve Johano-Mario, Francisko, Lucia, Ĵaklino, Vito, Jakvo -kaj Francisko Simonnet el Mirecourt- deĵoris dum parto de tiuj 2 tagoj. Verŝajne pli ol 100 personoj entute tre interesiĝis kaj estis informitaj.

Kun Henriko ni reprenis la materialon la 25an de marto kaj alportis ĝin al la 3a Junuldomo norde de Nancy (Trois-Maisons). Sed tie, en 4 tagoj, mi sukcesis(?) alparoli nur 3 personojn! Sekve al propono de Catherine Roux, Madeleine Roux kaj mi reprenos la ekspozicion la paskan mardon (2an de aprilo) kaj prezentos ĝin en IUT de Médreville, Bd Charlemagne, ĝis la 5a de aprilo.

Entute, ŝajnas ke ia nombro da personoj pli proksime interesiĝas al Esperanto sekve al tiuj eventoj. Sed ĝis kiu grado? Ĉu ili decidiĝos eklerni,

Ni disdonis demandaron, en kiu ni proponis la jenajn aranĝojn:

= Rapida kurso 10-leciana (per "M^o11) ek de la 3a de aprilo. Ni ne disgluas afiŝojn pro tempomanko, sed kalkulas kun komunikoj en la gazetaro kaj la "perbuŝa" propagando farita dum la ekspozicioj. 10 gelernantoj estas bezonataj.

= Ĉiumonata staĝeto por komencantoj: tiuj staĝetoj, kiuj funkciis ĉi-jare por progresantoj, povus okazi denove la 2an sabaton de ĉiu monato, de la 10a ĝis la 17a horo... ek de 12 gelernantoj. (ili kompreneble ne plu funkcios por progresantoj ĉi-jare).

= La "normala" vespera kurso por la venonta lernjaro estas jam anoncita: ĝi funkcios ekde la 9a de oktobro.

= ...Kaj kompreneble la plu funkcianta Perkoresponda Kurso.

MONATAJ STAĜOJ EN NANCY



Sekve al peto de staĝaninoj en Thionville komence de oktobro, staĝetoj (nur 1a-grada, nur 1 kurso) estis planitaj en Nancy ĉiumonate.

Tiuj staĝoj okazas principe la 2an sabaton de ĉiu monato (krom decembro pro la "semajnfino" en HOMBURG). Ili interesas gelernantojn, kiuj finlernis elementan kurson (per M11, "Junul-Kurso" aŭ Racia Kurso). Oni studas M12 kaj pluse legas la 2 verkojn de Claude PIRON: "Gerda malaperis" kaj "Lasu min paroli plu!". Horaro: de la 10a ĝis la 17a horo kun paŭzo tagmeze.

La 1a staĝo okazis la 10an de novembro; ĉeestis 9 gelernantoj el Luksemburgio, Thionville, Hetange, Cirey-sur-Vezouze kaj ĉirkaŭaĵo de Nancy. La tagmeza manĝo okazis en memserva restoracio "Flunch". Ni bone kaj multe lernis el la unua leciono de M12 kun aldonaj listoj de "transitivaj verboj" (kaj netransitivaj!), kun multe da ekzemploj. La 2 jam menciitaj libretoj de Piron ĝojigis ĉiujn kaj ebligis labori ĝis la 17a horo sen troa laceco...

La 2a staĝo okazis la 15an de decembro. Ĉeestis entute denove 9 gelernantoj, sed pro neĝo la Luksemburgianoj ne povis veni, la aliaj malproksimaj alvenis trajne. Ni komune manĝis "Kuskuson" en najbara restoracieto, kaj posttagmeze, post la 15a, Johano Mario vizitis nin kun gitaro kaj ni kantis (memore al Dr^o Zamenhof kompreneble!).

La nombro de staĝanoj ĝenerale ne atingis 10 personojn. La 3a staĝo okazis la 12an de januaro, la sekvantaj la 9/2 kaj 9/3. La sekvantaj okazos la 13/4, 11/5 kaj 8/6. Ekzameno unuagrada okazos en junio. Aliaj personoj povos veni por trapasi tiun ekzamenon. Kelkajn staĝanoj partoprenas la tutan staĝon, aliaj venas nur posttagmeze.



SEKVOJ = ...de la Biologia Foiro en NANCY (majo 1990).

Entute... 1 lernantino aliĝis perkoresponde (sed lernis nur 2 lecionojn en 6 monatoj); aliaj promesis veni al vespera kurso sed... ne venis (malgraŭ realvoko!).

...de la Festo de Homo kaj Naturo en THAON-les-VOSGES (septembro).

2 personoj lernas en vespera kurso en NANCY, 2 aliĝis perkoresponde. Multaj promesis plenigi kaj resendi demandaron aŭ aliĝilon al la kurso... sed tion faris nur 2. Kelkaj interesiĝis pri staĝoj en EPINAL, GERARDMER, eĉ NANCY... sed ŝajne nenio rezultis.



**** plus rapide... plus efficace ...

 NOTRE NOUVEAU COURS D'ESPERANTO
PAR CORRESPONDANCE



- ★ un matériel MODERNE
- ★ une technique EPROUVEE
- ★ un réseau d'animateurs COMPETENTS
- ★ un savoir IMMEDIATEMENT opérationnel

*une diffusion
sur toute la région
France - Est
et au-delà!*



PERKORESPPONDA KURSO = Mi dissendis al la gazetaro 42 komunikojn kaj ĝis nun povis kontroli la aperon de nur 18 el ili. Ĝenerale ili ne vekis tre grandan intereson, ĉefe en Alzaco, kie la gazetoj enpresas nur etajn resumojn. Entute mi respondis 85 informpetojn sed ĉirkaŭ 15 sekvis la Biologian Foiro en Thaon, 15 aliaj en Nancy mem rezultis de 2 radio-intervjuoj kaj ĉefe de disdono de flugfolioj kaj afiŝoj en kaj ĉirkaŭ Nancy kaj de lokaj suplementaj gazetkomunikoj. Do efektive perkoresponde venis 55 informpetoj. 15 gelernantoj aliĝis ĝis fino de marto (lastjare samdate: 25), plus 17 al la parola kurso en Nancy oktobro. La laste aperintaj komunikoj, aŭ ne vekis intereson de la publiko, aŭ nur 1 informpetinto el 10 aliĝis efektive (lastjare 1 el 3 aliĝis!). Kutime, dum malfavora neĝa vetero, ia homoj pli pozitive reagis por lerni perkoresponde. Ĉi-jare decembre kaj januare... tute ne!

El 32 gelernantoj de la pasinta lernjaro nur 7 finlernis "M11". El ili, nur 3 plulernas per "M12" Pluraj kunlaborantoj de la kurso malfacile sendas raporton pri laboro -aŭ nelaboro!- de sia lernantaro. Kelkaj nenion sendis de post la 1a trimestro 90. Ne sciante, ĉu kelkaj gelernantoj laboras aŭ ne, mi dissendis fine de oktobro cirkuleron al 22 el ili. Nur 3 bonvolis respondi, indikante kial ili ne -aŭ ne plu- lernas, pro diversaj kaŭzoj.

ATTENTION...
dernier numéro!

ATENTON !!! LASTA NUMERO !!

Jes, se vi ne pagas vian abonon por La Informilo, ĉi-tiu numero 73 estas la lasta sendita al vi.

Kiel scii, ĉu vi jam pagis vian abonon? Tio estas tre facila: Sur la adres-etikedo de via Informilo, la unua linio konsistas el la adreso-kodo kaj poste la abono-jaro. Se tiu abono-jaro estas 91, tiam vi estas jam paginta vian abonon por 1991. Gratulojn! Post la abono-jaro troviĝas mencioj pri viaj pagoj por la koncerna jaro, A=abonanto, F=federacia membro, poste UFE UEA ktp.

Se la abono-jaro estas 90, tiam aperas poste la mesaĝo Lasta Numero !!, tio signifas, ke vi ankoraŭ ne pagis vian abonon por 1991. Bonvolu tion fari senprokraste, se ne, vi donos al nia kasisto la malagrablan taskon, sendi al vi en majo aŭ junio alvok-leteron, kiun vi verŝajne ne ŝatus ricevi, kaj kies afranko estas plia elspezo por la Federacio. Krome vi riskas ne regule ricevi La Informilon.

Abono al La Informilo por enlandaj adresoj	45 FF
Abono al La Informilo por eksterlando	15 Rpk aŭ 57 FF
Federacia kotizo	24 FF
Bankkostoj, se vi pagas per bankĉeko el eksterlando	20 FF

Al nia poŝtĉekkonto: Aŭ al nia kasisto:
FÉDÉRATION CULTURELLE DE L'ESPÉRANTO 1997 72W NANCY S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM.

Vi atentu, ke via kotizo pagita al UFE neniam entenas la abonon al La Informilo. Sed vi iĝas aŭtomate membro de nia federacio, kondiĉe ke vi loĝas sur la federacia teritorio (departementoj 54 55 57 67 68 88) aŭ en apudaj landlimaj regionoj. Se via adreso estas ekster tiuj regionoj, bonvolu aparte paĝi vian federacian kotizon je 24 FF por iĝi aŭ resti federacia membro.

Aparte mi dankas al la abono-pagintoj, kiuj samtempe sendis al mi siajn afablajn bondezirojn por la nova jaro. Al ili mi reciproke deziras plej feliĉan nova jaron, kun prospera partopreno en la diversaj Esperanto-aranĝoj.

A. Grossmann



SPECIALA INFORMILO

En la lastaj jaroj, kelkaj grupoj en nia federacio, sukcesis kolekti kelk-cent adresojn de eventualaj interesigantoj, aŭ de inform-petantoj pri Esperanto, okaze de Forumoj, Foiroj, Ekspozicioj, inform-petoj ktp. Dum la lasta komitat-kunsido okazinta en Thionville estis decidita krei specialan Informilon nur franc-lingvan sendotan propagando-tele al tiuj kolektitaj adresoj. Ĝi donas, ne nur informojn pri Esperanto, sed ankaŭ proponas aliĝon al la perkoresponda kurso kaj abonon al la Informilo.

Tiu unua speciala Informilo aperis komence de marto kaj estis sendita al pli ol 540 adresoj. Dua numero estas planata por venonta septembro. En ĝi povos tiam aperi informoj pri la diversaj parolaj kursoj okazontaj en nia federacio kun la adresoj de la koncernaj respondeculoj. Ankaŭ tute lokaj informoj povus aperi en ĝi: staĝo, kurso, konferenco en iu urbo. Pli poste ni decidus, laŭ la akiritaj spertoj, kiel daŭrigi la eldonadon de tiu speciala Informilo. Kompreneble, se post pluraj alvokoj, estiĝas nenia reago, tiam la konceraj adresoj estos forigitaj.

Tiu propagando estas ebla dank'al la kunlaboro de pluraj samideanoj, por realigi la bultenon, por bejori la Esperanto-budo, por kolekti la adresojn, ktp. Eble vi-~~me~~ ankaŭ sukcesis trovi unu aŭ eĉ plurajn amikojn de eventualaj interesigantoj aŭ de inform-petantoj pri Esperanto. Tiam ne hezitu, bonvolu komuniki ĝin aŭ ilin al nia trezoristo: S-ro André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, kiu enkomputorigos ilin por kompletigi la nunan adresaron. Tio ebligos al ni, sendi al ili la venontajn numerojn kaj eble varbi novajn lernantojn. Nia nuna financa situacio ja ebligas al ni plani tian propagand-kampanjon. Tial vi ankaŭ estas invitita ĝin partopreni. Ni esperu ĝin sukcesa kaj fruktodona.

A. Grossmann



LA RONKANTA AVO

Andre Weckmann



CONNAISSEZ-VOUS LE "PAPY RONFLEUR"?...

★ 17

"LA RONKANTA AVO" de André WECKMANN, elgermanigita de Edmond LUDWIG. Publikigita de la Orientfranca Esperanto-Federacio. Prezo: 25 FF.

André WECKMANN estas ĉarma 66-jarulo, kiu konservis la naivecon kaj la freŝecon de sia romantika puberiĝo; tio estas iom ĝena, kiam li parolas pri seriozaj aferoj, kiel pri la dulingva edukado en Alzaco, sed tio estas granda helpo, kiam li skribas libreton por infanoj. Oni dezirus, ke li estu neniam verkin-ta alie.

Edmond LUDWIG tre pravis, do, elekti la ĉarman "La ronkanta avo" por komenci la serion de libretoj, kiun la Orientfranca E^o-Federacio volas eldoni. La historio okazas en tute fantazia lando, kie ene de urbo sin trovas vasta ĝardeno sovaĝiĝinta, konata nur de la infanoj kaj ne de la konstruistoj. A.W. imagis ankaŭ urbestron, kiu faras el ĝi ludejon por la infanoj... Sur la lasta kovrilpaĝo E.L. indikas, ke A.W. loĝas nun en Strasburgo: oni havas

la impreson, ke li loĝas, pli bondire, en siaj revoj.

La propraj nomoj iom surprizas: Elzaco anstataŭas la pli kutiman Alzaco; oni ne parolas pri Strasburgo sed pri Steinburg, kaj en la teksto, Bachmüller estas esperantigita Bahmiler... Sed mi ne volas rekomenci alian korean militon, kaj pri ĉio-tio mi ne diskutos. Mi diru nur, ke nenio ŝokis min en la lingvo kaj ke la stilo, volonte tre simpla, ebligas la uzadon de la libro en la porinfan-kursoj. Tre rekomendinda libro!

recenzis B. AUNIS

Ni rememorigas al niaj legantoj, ke tiu sprita rakontaĵo estas eldonita de nia Federacio. Ĉu riveli sekreton asertante, ke dua verko: -kompilo de elstaraj aliaj rakontaĵoj verkitaj de unu el niaj lokaj samideanoj - baldaŭ aperos siavice... Sed ni devas elĉerpi la stokon de la "Ronkanta Avo"!... Nepre havigu ĝin al vi!...

☆

ABONOJ - 1991 Prezoj en francaj frankoj

Brita Esperantisto (ĉiun duan monaton)	100	Kontakto	70
Bulgara Esperantisto	100	Kulturaj Kajeroj (4 numeroj)	70
Bulteno Internacia Muzeo (Wien)	35	La Juna Amiko (4 foje jare)	30
Dia Regno (11 numeroj)	65	La Kancerkliniko (por 5 numeroj)	100
El Popola Ĉinio 1 jaro	102	La Ondo (el Sovetunio)	60
2 jaroj	165	Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado (LPLP)	165
3 jaroj	225	Literatura Foiro (6 numeroj/jare)	155
Ekumenismo	60	Literaturaj numeroj de Franca Esperantisto	
Enigmo (spritaj ludoj)	96	po 3	60
Esperanto (por ne membro-abonantoj de UEA)	135	po 1	25
Espéranto-Actualités (en français) pour 5 ans	160	Monato (12 numeroj/jare)	185
Esperanto-Dokumentoj serio de 10	115	(aerpoŝte)	230
en la angla, franca aŭ Esperanto		La Jaro (poŝkalendaro de Monato)	24,50
Espero el Koreio (6 foje jare)	50	Simpozio (2 foje jare)	60
Espero Katolika	140	Skolta mondo	30
Fonto (Literatura revuo)	100	Survoje (beletra, kultura revuo el Sovetunio)	110
Franca Esperantisto (por ne aktivaj membroj)	155	Verda Lupeo/Fenikso	60
Franca Katolika Esperantisto	40		
Heroldo de Esperanto (16 numeroj/jare)	120	Forpasis Fokuso kaj Hungara Vivo.	
(aerpoŝte)	145		
Isaela Esperantisto (3 numeroj)	50	Abonigi geamikojn el nepagipovaj landoj ankaŭ eblas pere de UFE.	

KONTOJ DE LA LIBRO-SERVO 1990

ENSPEZOJ

vendo de libroj	14 996,00
vendo de muzikaĵoj	126,00
vendo de diversaj objektoj	280,00
repagiataj afrankoj	383,30
diversaj kreditoroj	166,60
entute	15 951,90

ELSPEZOJ

aĉeto delibroj	15 772,93
aĉeto de diversaj objektoj	0,00
afrankoj	1 174,23
repago de la kreditoroj	45,51
diversaĵoj	83,80
dogano	182,00
entute	17 258,47

Ĝiro al la ŝparkonto de la Federacio 5 000,00 F

POŝT-ĈEKA KONTO N° 2800 76 H en Nancio

Havo je la 1a de januaro 1990: 6 514,60
 + 15 951,90
 - 22 258,47

Havo je la 31a de decembro 1990:	208,03
----------------------------------	--------

KOMENTOJ

Ne eblas paroli pri financa rezulto, ĉar la stoko ne estis valorigita je la fino de la jaro. Se la stoko samvalorus la unuan kaj la lastan tagon de la jaro, oni povus konsideri la rezulton kiel diferencon inter la enspezoj kaj la elspezoj.

Tio estas: 17 258,47 - 15 951,90 = malgajno 1 306,57 F

En aŭgusto ni faris la inventaron kaj kalkulis ties valoron:

laŭ la venda prezo (100%), estis 81 558,00 F

laŭ la aceta prezo (70%), estis 57 090,00 F

(inkluzive de "La ronkanta avo", por 11 250,00 F en venda prezo)



Fr.-X. GILBERT

MI KONATIĜIS KUN LA KASTELO DE GRESILLON"...

Kion mi agrable povas fari dum la feriado? Tio estas la demando. De antaŭ unu jaro, mi kutimis ĉeesti al la E°-kursoj organizitaj de Sr° Colnot ĉe la MJC de Nancy. Uzante la metodojn "M 11", "M 12" kaj diversajn librojn, mi sukcese trapasis en la fino de junio la "ateston pri lernado".

Post la skrib-lernado, tamen mankis al mi la praktikado de la lingvo. Tial mi registrigis min al la ESPERANTO-KULTURDOMO. Je 2 k°j apud BAUGE, sur la kamparo, starigas la kastelo "Grésillon". Varmegaj akceptado kaj instalado en la ĉambroj (unu- aŭplurlitaj laŭdezire). Poste la aroj kreĝis; iuj konis jam aliajn, la ceteraj klarigis, de kie ili venis, kelkafoje -kiel mi- per lingvomiksado kaj tamen ĉiuj povis bone kompreni.

Dum la restado multaj eksterlandanoj alvenis, ĉirkaŭ 40 ĉeestantoj (DDR, RFA, NL, P, J, BZ, GB, PL kaj F), kiu interkompreniĝis sen peno, eĉ por la komencantoj. Matene, post la manĝo, ni ĉeestis kursojn, de la 9a30 ĝis la 12a30. Posttagmeze, libertempo permesis al ni okupiĝi per promenado, sies-to, skribado, ekskurso, lesivo, ktp. De la 17a ĝis la 19a ni denove kursumis, pli malpli serioze, per ludoj, dum kiu ni devis klarigi tekston aŭ situacion. Vespere ni povis ĉeesti diversajn okupaĵojn: E°-televid-filmo, lumbildoj, kantoj kaj koncerto per piano aŭ fluto, prelego pri la Universala Kongreso en KUBO...

Oni ankaŭ havis eblecon viziti la proksimajn vidindajn urbojn (ANGERS, SAUMUR...) kaj iuj eĉ trapasis ekzamenojn en la fino de la stago.

Bedaŭrinde 15 tagoj ne daŭras eterne kaj ni devis forlasi tiujn feriadlokojn, ne sen interŝanĝi niajn adresojn kaj promesante skribi aŭ revidiĝi!



VITO (84-FROUARD)

EL NIA LETERKESTO

"... De antaŭ novembro, ĉiun duan sabaton de monato, estas organizata staĝo de dua grado, de Sr° Colnot, en M. J. C. Ph. Desforges. Ni estas dek gepartoprenantoj, kiu venas el Luxembourg, Thionville kaj el la regiono de Nancy. La staĝo komenciĝas je la deka horo kaj finiĝas je la 17a.

Ni laboras matene per la "Metodo 12". Tagmeze ni manĝas kune ĉe restoracio, kie ni ŝatas ĝian "dom-kuskuson". Posttagmeze ni daŭrigas la lecionon, legas tekstojn kaj kantas. La kursoj disvolviĝas en bona humoro. Dum la du lastaj staĝoj, oni festis la datrevenon de Zamenhof kaj "lotumis la Reĝojn"... Je la 17a horo ni disiĝas kaj atendas la baldaŭan, kie denove ni retroviĝos".

- Jakvo -



PLEZURIGU VIAJN GEAMIKOJN...

VIVIGU VIAN FEDERACIAN LIBRO-SERVON!

DONACU LIBROJN...

===== MESAĜO EL POLLANDO =====


"...Dankon al ĉiuj, kiuj afable
aĉetis la de mi tradukitan ver-
kon de pola Sinjorino...

... Maria KOWNACKA,

"LA AVENTUROJ DE KAJĈJO"

Por iu el la cent unuaj aĉetint-
toj, mi propramane brodis ara-
nean tuketon, kiun mi tutkore
donacas al li aŭ al ŝi, memore
de internacia amikeco. Tion mi
dezirus fari por ĉiu el vi!..."

Maria SITNIK



écrit, en langue
es petits et les
ts très cocasses
la basse-cour,
jeune cigogneau
ur découvrira la
lin, de faire la
autres choses
essins originaux
rtaine à cet ou-
ité.

L'EDITEUR



LA LIBRO ESTAS AĈETEBLA ĈE LA FEDERACIA LIBRO-SERVO

12, Rue Estienne d'Orves - 54490 F-PIENNES



Ĝi ankaŭ estos akirebla dum la staĝo, ĉe nia federacia
multfaceta libro-prezentado, kiu cetere permesos al vi
konatiĝi kun la lastaperintaj eldonaĵoj de la E^o litera-
turo. Tiam nepre kaptu la okazon por riĉigi vian libro-
bretaron. Nur dank' al vi daŭre fruktiĝos nia tutmonda
E^o-verkaro!

NIAJ DONANCINTOJ EN 1990

Ni sincere dankas al la sekvantaj personoj, kies donacojn ni ricevis dum la kotizo-jaro 1990:

Donacoj por la Federacio:

S-ro GUEGUENIAT 55 FF - Diversa 9 F
Sume 64 FF

Donacoj por La Informilo:

S-ino BLANCHET 32 FF - S-ro CRANCE 32 FF - S-ro B. DENIS 52 FF
S-ino FERNEX 32 FF - S-ino MASSARD 55 F - S-ino ORY 155 FF -
Sume 358 FF

FINANCA RAPORTO ORIENTA FEDERACIO 1990
--

dato 25.02.1991

<u>ENSPEZOJ FEDERACIO</u>		<u>ELSPEZOJ FEDERACIO</u>	
116 Federaciaj membroj	2674.00	17 Sekretariaĵoj	1474.30
76 UFE-membroj kun pago	1429.50	7 Propagando	1967.20
2 Donacoj al Federacio	64.00	4 Perado de kotizoj	1070.00
9 Perado kotizoj abono	1473.00	1 Aĉeto de materialo	98.00
1 Rentumo kaj sikavoj	928.27	1 Perado de abonoj	403.00
2 Vendo de materialo	122.00	1 suldo al Libroservo	5000.00
1 Prunto de Libroservo	5000.00	2 Federacia premio	299.00
2 Profito staĝoj	1439.80	1 Diversaĵoj	50.00
	-----		-----
	13130.57		10361.50
<u>ENSPEZOJ INFORMILO</u>		<u>ELSPEZOJ INFORMILO</u>	
222 Abonoj al Informilo	10085.84	1 Eldono Inf.69 390 ek	1110.00
6 Donacoj al Informilo	358.00	1 Eldono Inf.70 320 ek	1027.20
	-----	2 Eldono Inf.71 340 ek	1197.60
	10443.84	1 Eldono Inf.72 320 ek	1085.00
		1 Riparo de tajpilo	94.00
		4 Enlanda sendado Inf.	421.82
		3 Eksterland.sendkosto	482.00
		8 Materialo por Inf.	584.10

			6001.72
ENSPEZOJ FEDERACIO	13130.57	ENSPEZOJ INFORMILO	10443.84
ELSPEZOJ FEDERACIO	10361.50	ELSPEZOJ INFORMILO	6001.72
	-----		-----
<u>PROFITO FEDERACIO</u>	2769.07	<u>PROFITO INFORMILO</u>	4442.12
Havo je la 31 12 89	18010.15		
PROFITO FEDERACIO	2769.07		
PROFITO INFORMILO	4442.12		

Havo je la 31 12 90	25221.34		

La trezoriisto:
A. Grossmann

Nia financa situacio estas bona dank'al favoraj eldon-kostoj de La Informilo. Tamen la nombro da abonantoj malkreskis en 1990 kaj estas eĉ ion pli malalta ol en 1988. Nia last-jara gajno estas denove perdita. Nia nuna financa situacio ja devus ebligi al ni pli amplekse propagandi. Ĉu tio helpos al ni regajni en 1991 tiujn perditajn abonantojn?

nos cotisations 1991

Vous venez de recevoir notre bulletin d'information sur l'espéranto, "LA INFORMILO". Vous avez sans doute apprécié son contenu et vous désirez le recevoir régulièrement (4 numéros par an). A cet effet nous vous présentons ci-dessous les différentes cotisations 1991 et nous vous invitons à les payer dès maintenant.

Nous espérons vivement vous retrouver parmi nos abonnés ou nos membres!

Nous vous recommandons vivement de choisir votre cotisation à partir de la catégorie 3. Ce faisant, vous apportez votre adhésion et votre soutien à l'UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO, association qui agit sur le plan national, tant dans le domaine de l'information en général que dans celui des relations avec les instances officielles. Vous concevez aisément que son efficacité et sa crédibilité dépendent essentiellement du nombre de ses adhérents.

COMMENT PAYER VOS COTISATIONS ET VOTRE ABONNEMENT

- 1/ Les cotisations à l'U.F.E. et à l'U.E.A. (catégories 3 et 4, colonnes encadrées) sont à payer directement à UFE, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS - CCP: 855 35 D PARIS, en y joignant votre bulletin d'adhésion. Votre adhésion à notre Fédération est comprise dans les cotisations de l'UFE, si vous habitez les départements 54 55 57 67 68 88. Par contre l'abonnement à LA INFORMILO reste à payer à notre Fédération. Voir ci-après
- 2/ La cotisation à la FEDERATION CULTURELLE DE L'EST ainsi que l'abonnement à LA INFORMILO sont à payer:
 - de préférence par virement postal à FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO
CCP: 1997 72 W NANCY (pratique et sans frais)
 - par chèque bancaire à l'ordre de cette même Fédération... mais ce chèque est à envoyer à notre trésorier: A. GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM.
- 3/ Exceptionnellement, les membres du groupe de Strasbourg sont priés de verser leur cotisation au CENTRE CULTUREL ESPERANTO, CCP: 49917 STRASBOURG, en y ajoutant leur cotisation au groupe local (20), ou directement à leur trésorier, B. REIFFSTECK, 4, rue de Neuchâtel, 67000 STRASBOURG. Joindre votre bulletin d'adhésion spécifique pour les cotisations de l'UFE.

Cat. TABLEAU DES COTISATIONS 1991

Cat.	cotis.	abonnem. Informilo
1 = abonnement simple à La INFORMILO		45 F
2 = adhésion simple à la FÉDÉRATION CULT. DE L'EST		
* membre fédéral avec abonnement à La INFORMILO	24 F	+ 45 F
* membre fédéral sans abonnement à La INFORMILO pour les autres membres de la famille par exemple	24 F	
3 = adhésion à la FÉDÉRATION et à l'U.F.E.		
* membre simple	100 F	+ 45 F
* membre actif JEFO moins de 30 ans au 01.01.91	100 F	+ 45 F
* membre actif JEFO Etudiant, chômeur, scolaire, militaire	65 F	+ 45 F
* membre actif UFE avec la revue de l'UFE, "FRANCA ESPERANTISTO"	240 F	+ 45 F
* membre actif UFE conjoint	130 F	
4 = adhésion à la FÉDÉRATION + U.F.E. + U.E.A.		
* membre individuel reçoit "F.E." + guide de l'UEA	280 F	+ 45 F
* membre individuel reçoit "F.E." + annuaire de UEA + (revue KONTAKTO, si moins de 30 ans)	330 F	+ 45 F
* membre individuel reçoit "F.E." + annuaire de UEA + revue mensuelle ESPERANTO + (KONTAKTO, si moins de 30 ans)	465 F	+ 45 F

IMPORTANT

- 1 - Les nouveaux adhérents recevront par courrier séparé leur(s) carte(s) de membre à la Fédération, à l'UFE, à l'UEA, selon les cotisations payées ainsi qu'un exemplaire des status de notre Fédération.
- 2 - Les autres membres trouveront dans le bulletin La Informilo, qui suit l'enregistrement de leurs cotisations, les coupons de l'année 1991, à coller sur les cartes de membre respectives. Les membres de l'UEA y trouveront également les coupons 1991 donnant droit au service des délégués mondiaux dont les adresses se trouvent dans l'annuaire de l'UEA.
- 3 - Les membres de l'Enseignement, payant leur cotisation de l'UFE, sont invités à mentionner leur profession; ils seront ainsi inscrits d'office au GROUPE DES EDUCATEURS ESPERANTISTES GEE.
- 4 - Les jeunes de moins de 30 ans au 01.01.91, payant leur cotisation de l'UFE ou de JEFO, voudront bien mentionner leur date de naissance; ils seront ainsi inscrits d'office à l'ORGANISATION DE LA JEUNESSE ESPERANTISTE FRANÇAISE JEFO et recevront alors en plus la revue Koncize et le bulletin interne national JEFO informas. Ils auront droit de vote au Comité de JEFO.





KRUCVORT-ENIGMO

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1			■									■
2					■		■		■			
3			■								■	
4					■							
5					■		■					
6			■	■			■		■			
7			■									
8	■				■	■						■
9		■										■
10				■		■					■	
11							■	■		■		
12						■						

HORIZONTALE

1 sufikso (r) - leĝe agnoskita (r). 2 gaso (r) - adverbo. 3 numeralo - ĉirkaŭ la piedo - metalo (r). 4 rara, ĉarma besteto (r) - maniere sin prezenti. 5 fingroprotektilo - nederlanda filozofa (r). 6 parto de lokomotivo - sufikso - kapo de tropikbirdo. 7 japana fotofirmao - malpuraĵo (fonetike). 8 kaptilo (r) - antikva dio. 9 murdoruĝado. 10 kokinproduktaĵo - malgrandigita periodo. 11 kruela regnestro - prepozicio. 12 eksteriĝo - metala pagilo.

VERTIKALE

1 enkonduki (mikrobon...) - parto de botelo.

2 frakcio - fadenelstaraĵo sur mukozo (r). 3 faro (r) - konservi en spirito. 4 parenco - participfinaĵo - sufikso. 5 sufikso - korpostato. 6 brita insulo. 7 verba finaĵo - ŝovi langon sur. 8 verifianto. 9 monero (r) - heroo de araba rakonto (r). 10 sortoricevaĵo (f) - trinkaĵo (r) - poemo. 11 ronĝulo (inverse kaj r) - sufikso. 12 geometria ĉirkaŭaĵo (r) - instrumento;

SILAB-ENIGMO

Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj vorteroj, malkovru la vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, elformas proverbon.

ba bes ci ek er ero ero fa fal ga go in in is it ko kor la mo mo nat ni no no no nor nu op ra rio rio ro si sto ta to tro tru tu ur ur uv vo zer zi

1	+	-	-	+	-	-			frandaĵo
2	+	-	-	+	-	-	-	-	orkestra peco
3	+	-	-	+	-	-			manĝebla vegetaĵo
4	+	-	-	+	-	-			monopoliganta komercistaro
5	+	-	-	+	-	-	-	-	vojaĝvojo
6	+	-	-	+	-	-	-	-	administranto
7	+	-	-	+	-	-	-	-	birdo
8	+	-	-	+	-	-	-	-	dento
9	+	-	-	+	-	-			ne loĝas sur kamparo
10	+	-	-	+	-				modelprincipo
11	+	-	-	+	-	-	-	-	medalsribaĵo
12	+	-	-	+	-	-			saloelemento
13	+	-	-	+	-	-			religio
14	+	-	-	+	-				muzika teatraĵo
15	+	-	-	+	-	-	-	-	oficisto
16	+	-	-	+	-				trompe ŝanĝi

SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ (72)

Krucvort-enigmo: grumbli jen lemur omaro ombr or ulik bir dvin akt ume ofte pru sufer ocimo otelo domen cim eskap mi elektr zebr lert fid tri ikar aĉe ulo

Silab-enigmo: "Malbona herbo froston ne timas".

Sr^o BLANCHET (52-St-Dizier) premiigis plej rapide (kiel ĝiufoje!). Sed li koranime reŝignis pri sia premio. Sekve Ginette MARTIN kaj Georges VERDIER estas niaj laŭreatoj!